Prilaborita en 11 aŭgusto 2015

Ĉiam ĝisdata ĉe
https://cindymckee.com/librejo/pentrartaj_terminoj.pdf

Pentrartaj terminoj por pentristoj El mia PDF pri kazeinfarbo kaj el tiu kaj tiu [*mi* = mi inventis]:

Alcida rezino, alcido*mi*, alternative ‘alkido’ laŭ la Angla-esperanta Kemia Vortaro de Duncan, 1956 kaj trovita enrete en Majstro: Poliestero modifita per aldono de grasacidoj kaj aliaj substancoj. Formita de *al*coholo kaj organikaj *acido*j, kiel ankaŭ la vorto *alcido* mem. En pentrarto, alcidoj estas uzitaj pro la sekiĝa tempo, kiu kuŝas inter la sekiĝa tempo de olefarbo kaj tiu de akrilfarbo. Angle *alkyd;* antaŭa literumo *alcid*. **Rim**. R. H. Kienle elpensis la terminon ‘alcid’ kaj poste decidis ke ‘alkyd’ estas pli belsona.
Akrilfarba pentrado: Tiu procedo de la akvopentrarto kiu uzas artefaritan akrilan rezinon en akvo kiel la vehiklon por pigmentoj. Akrilfarbo estas unu el la akvofarboj, sed iĝas akvorezista kiam sekiĝinta. Angle *acrylic painting*. **Rim**. Akrila rezino permesas travideblecon de la pigmentoj kun saturita aspekto kaj rapidan sekiĝadon al farbotegaĵo kiu ne povas esti ree prilaborita.
Akvarelfarba pentrado: Tiu procedo de la akvopentrarto kiu kutime uzas araban gumon kiel gluon. Akvarela farbo estas travidebla kaj brila. La dumpentra vehiklo estas akvo. Angle *watercolor painting*. **Rim**. Paperfolio sorbas la akvecan farbon ĝis la pigmentoj iras en kaj sur la erojn de la papero, male al multaj aliaj farbotipoj, kiuj tegiĝas sur la surfaco de la subporta bazo.
Akvofarboj: Tiuj farboj, kiuj uzas akvon kiel solvaĵon, nome akvarelofarbo, guaŝofarbo, akrilfarbo kaj

kazeinfarbo. Angle *watermedia*.
Akvopentrado: Tiu procedo de la pentrarto kiu uzas la akvofarbojn.
Akvopentrarto: Kategorio de pentrarto kiu uzas la akvofarbojn por pentri. Angle *watermedia*.
Alizarino: La historia pigmento alizarino venas de la radikoj de la planto tinktura rubio. Pro tio ke ĝi paliĝas sub lumo, nuntempe Kinakridono estas pli populara ol eĉ sintezita alizarino. Angle *alizarin.*
Amasa koloro, densa koloro[mi] *:* Plena koloro de pigmento kiam farbo estas aplikita dense. Angle *masstone, body color*. **Rim**. Pigmento en farbo povas esti malsamaj koloroj kiam aplikita dense ol maldense.
Araba gumo, akacia gumo: Suko el du specioj de akaciaj arboj, uzita kiel gluo por krei durajn paŝtelojn kaj akvarelan farbon. Angle *gum arabic*.
Artperaĵo(j)[mi]: Tipo de mark-kapabla aĵo, kiel farbo aŭ krajono, aŭ pli larĝe, la rimedoj uzitaj por ebligi artistan esprimon. Angle *medium,* plurnombre *media* – unu el la signifoj de ‘medium’.
Azo-pigmentoj: Pigmentoj ofte kreitaj per ligo de azo-tinkturo al senkoloraj grundoj, kiel kaolino, efektive kolorigante la grundon. Foje, la azo-tinkturoj estas lejkigitaj al aliaj metalaj saloj. La popularaj azo-pigmentoj estas ĝenerale intense flavaj ĝis ruĝaj, kun bonegaj lumrezistoj. Populara ekzemplo estas azo-flavo, ankaŭ nomita monoazo-flavo, arilido-flavo, Hansa flavo. Angle *azo pigments*.
Baza koloro, unuaranga koloro aŭ **primara koloro**: Koloro ne miksebla, esceptante nigron kaj blankon. Ofte, aro de tri bazaj koloroj estas uzita por miksi ĉiujn aliajn kolorojn. En la arto la tri tradiciaj bazaj koloroj estis ruĝo,

flavo kaj bluo. Tamen, nun artistoj ofte uzas la tri bazajn kolorojn de pigmentoj: la aron fuksino(magento), flavo kaj cejano(ciano). Koloroj de pigmentoj estas produktitaj de reflekto kaj sorbiĝo de lumo. Baza koloro de pigmento estas koloro kiu samkvante reflektas du bazajn kolorojn de lumo. Intersekco de ruĝa kaj blua lumoj produktas fuksinan koloron. Intersekco de blua kaj verda lumoj produktas cejanan koloron. Intersekco de verda kaj ruĝa lumoj produktas flavan koloron. Ilustraĵo de bazaj koloroj de lumo. Pri baza koloro en Vikipedio. Vd. Kolorcirklon de bazaj koloroj de pigmentoj. **Angle** *primary color*. **Rim**. Efektive, miksaĵo ne povas alproksimiĝi al blanko. Do, en la praktiko, blanko estas nemalhavebla fundamenta koloro por la paletro.

Blanko: Mi nomas *blanko* ne nur la koloron, aŭ mankon de koloro, depende de la vidpunkto, sed ankaŭ uzon de kalko aŭ alia blankeca, grajneca mineralo en preparoj de grundo kaj farboj. Per tiu uzo, mi evitas la vorton *kalko* en tiu rolo. Angle *whiting*.

Bruno: Pentristoj foje konsideras bruon varma grizo, ĉar ankaŭ miksita per la tri bazaj koloroj, sed kun malalta kvanto da cejano. En kolorgrupoj, bruno estas malhela oranĝo.

Ceruzo, plumboblanko: ☠Unu el la plej fruaj pigmentoj; blanka, butereca pigmento kiu sekiĝas rapide al tre longedaŭra tegaĵo. Angle *flake white, lead white, Cremnitz*. **Rim**. Pro la veneneco de la plumbo en ceruzo, tiu pigmento ne estu uzita ĉirkaŭ infanoj aŭ en senzorga maniero.

Cejano/Ciano: Kolornuanco inter verdo kaj bluo. Angle *cyan*.

Ĉina inko: Inko ofte kreita de lampnigro, populara en desegnado. Angle *India ink, Indian ink*.

Cinabro, vermiljono: ☠1. La natura pigmento de cinabro enhavas venenan hidrargon, de hidrarga sulfido, sed ankaŭ la artefarita pigmento vermiljono. 2. Koloro intense oranĝe-ruĝa. Angle *cinnabar, vermilion.*
Damaro: Gumo ekstraktita el arbo; uzita kiel mola rezino en lako. Angle *damar, dammar.* **Rim**. Flaviĝas dum paso de tempo.
Dumpentra vehiklo: La vehiklo en kiu la peniko estas trempita dum pentrado. Angle *medium* – unu el la signifoj de ‘medium’.
Durtabulo^{mi}: Tre densa fibrotabulo kreita de fibroj ekstraktitaj de ligno. Angle *hardboard, Masonite* (proprieta marko). Fibrotabulo angle estas *fiberboard*.
Elgasiĝo^{mi}: Emano de gasoj el materialo al la ĉirkaŭa medio. Angle *outgassing, offgassing*. **Rim**. Kompreneble, estas problemo kiam la gasoj estas venenaj, kiel el lakbenzino.
Emulsio: (PIV) Likvo, en kiu mikroskope videblaj eroj estas stabile dispersitaj…konsistante en nature nemikseblaj enmetaĵoj.
Enkaŭstika pentrado, varmvaksa pentrado, pentrado per varma vakso, vaksa pentrado: Tiu procedo de la pentrarto kiu uzas vakson kiel gluon. Kutime abelovakso estas miksita kun damaro kaj tiu miksaĵo varmigita por krei fluecan vehiklon por pigmentoj. Ĉiu aplikita tavolo de pentraĵo estas varmigita por fiksi ĝin al la antaŭa tavolo. La varma vehiklo povas esti modlita, ne nur ŝmirita. Angle *encaustic painting, hot wax painting.*
Flokiĝo: Fenomeno en akvarela pentrado en kiu kelkaj malgrandaj pigmentoj tendencas ariĝi sur la paperfolio, formante flokojn. → Sedimentiĝo. Ilustraĵo. Angle *flocculate*.

Ftalocianina bluo: Intense blua artefarita pigmento, treege saturita en la amasa koloro. Angle *phthalocyanine blue (pron. thalosianin)*. **Rim**. 1. *Ftalobluo* mallonge. 2. Kutime havas verdan nuancon, sed ftalobluo kun ruĝa nuanco haveblas.
Fuksino, alternative **magento**: Koloro inter violo kaj ruĝo. En la kolorcirkloj r-v-b kaj f-c-f, fuksino troviĝas meze inter ruĝo kaj bluo. Fuksino estas unu el la bazaj koloroj de pigmentoj. Angle *magenta, fuchsia*.
Gipso: En artfarado, miksaĵo de iu kalka ŝtono kaj gluo, uzita kiel grundo por pentraĵoj. Angle *gesso*. **Rim**. Mi uzas la terminon en pli vasta senco.
Gluizolaĵo[*mi*]: Gluo uzita por ĉirkaŭi kaj izoli la konsistajn erojn de la subporta bazo. Angle *size*.
Gluvehiklo[*mi*]: Kun likvo, gluo estas la vehiklo por pigmentoj, kungluante ilin kaj kutime gluante ilin al la surfaco de la subporta bazo. La gluvehiklo estas la adhera parto de la farbo, respondeca por la formado de kohera tegaĵo. Angle *binder*.
Grizo: Vera grizo estas nomata neŭtra ‘koloro'; miksita per ĉiuj bazaj koloroj plimalpli proporcie. Grizo estas gamo de tonoj de blanko ĝis nigro. Maniero miksi kolortonon estas enmiksi etan kvanton da la kontraŭa koloro. Ju pli la kvanto da enmiksita kontraŭa koloro, des pli griza iĝas la almiksita koloro. Alia maniero estas samkvante miksi bluon, alternative cejanon, al ruĝo, alternative al fuksino. Enmiksu flavon ĝis vi vidas malhelan grizon (nigron). Enmiksu blankon ĝis dezirata tono. Per tiuj metodoj, vi povas miksi grizigajn tonojn de kolornuancoj ĝis vera senkromata aspekto. En Vikipedio.
Grundo: Mi nomas *grundo* tiun surfacon kiu ricevas la farbon. Ofte la grundo estas gipso aŭ simila miksaĵo

tegita sur la subportan bazon. Angle *ground*. **Rim**. Mi plivastigis la signifon.
Guaŝa pentrado: Tiu procedo de la akvopentrarto kiu uzas saman gluon por la farbo kiel akvarelfarba pentrado, sed kun aldona blanko enmiksita en la vehiklon por doni opakecon kaj/aŭ opakaj pigmentoj. Angle *gouache painting*. **Rim**. Guaŝo restas eterne ŝmirebla.
Gumiguto: ☠Venena, paliĝema verd-flava pigmento. La natura pigmento estas evitinda. Angle *gamboge, gamboge yellow*.
Helo^{mi}: Hela nuanco de koloro, miksita per aldono de blanko. Angle *tint*.
Heleco: Donanta heleco de koloro, juĝita laŭ proksimeco al blanko. Angle *value*. **Rim**. Depende de vidpunkto, heleco povas esti konsiderita parto de la gamo de tonoj 2. kun malhelo kiel la alia parto, aŭ heleco povas esti konsiderita la tuta gamo ĝis nigro.
Intenseco: Intenseco de koloro, juĝita laŭ distanco for de grizeco. La plej intense saturita koloro havas neniun aldonan blankon nek nigron. Angle *chroma*.
Kadmiflavo: ☠Pigmento iom venena. Bona rezisto al lumo. Angle *cadmium yellow.*
Kazeina emulsio: Mi nomas *emulsio* kazeinan gluvehiklon kun aldona oleo aŭ vakso.
Kazeinfarba pentrado: Tiu procedo de la akvopentrarto kiu uzas gluon de kazeina proteino. Angle *casein painting*.
Kinakridono^{mi}?: Angle *quinacridone.* Familio de artefaritaj organikaj pigmentoj kun bonegaj lumrezisto, intenseco, travidebleco, varmegorezisto, alkala-rezisto kaj rezisto al sangado dif. 2. **Rim**. De *quin(oline)* + *acrid(ine)* + -one.

Kobalta bluo: ☠Malvarme blua pigmento, konsiderita unu 'vera' bluo. Lumrezista. **Rim**. Ne enspiru; povas veneni. Angle *cobalt blue*.
Koloro: La termino ‘koloro’ en arto kutime temas pri saturitaj koloroj sen aldono de blanko, grizo aŭ nigro; ekzemple, bluo, ruĝo. Vd. kolornuanco. Angle **hue**, *color*. **Rim**. La termino koloro estas ofte ne distingita de nuanco, nek de tono.
Kolornuanco: En arto, nuanco estas koloro ne plene saturita, do miksita kun nigro, blanko aŭ grizo. Ekzemple, prusa bluo, cejano, helbluo estas nuancoj de la koloro bluo. **Sin**: *tono.* **Rim**. Ofte la vortoj koloro kaj nuanco estas uzitaj interŝanĝe.
Kolorcirklo: Ilustraĵo de la rilatoj inter koloroj. Ekzemplo. Fonto de la termino AIS-Sanmarino. Angle *color wheel*.
Kolormodelo: Matematika sistema priskribo de koloroj. Angle *color model*.
Kolorspaco: 1. Organizo de aro de koloroj en kiu la difinitaj koloroj varias laŭ modelo. Kolorspacoj estas nomitaj laŭ la bazaj koloroj pritraktitaj en la koresponda kolormodelo. 2. Apliko de kolormodelo. Angle *color space*. Ilustraĵo de kolorspaco de *bazaj koloroj de pigmentoj* flavo, cejano kaj fuksino. Intersekcoj montras la unua(ranga)jn miksaĵojn kaj intersekco de ĉiuj tri bazaj koloroj, nigron:

Kolorspaco F-c-F(m)

Prilaborita en 11 aŭgusto 2015

Kolortemperaturo: Maniero priskribi tiujn ecojn de koloro aŭ pigmento, laŭ varmeco aŭ malvarmeco relativa al la ĉirkaŭaj koloroj aŭ pigmentoj. En homa percepto, ĝenerale la ruĝaj ĝis flavaj koloroj estas konsideritaj varmaj kaj la violkoloraj, bluaj ĝis verdaj koloroj malvarmaj. Ilustraĵo de la varma kaj malvarma flankoj de kolorcirklo:



Ilustraĵo de varmaj grizoj per uzo de flavo, sekvitaj de malvarmaj grizoj per uzo de bluo:



Angle *color temperature*. **Rim**. Mezuroj de la efektivaj temperaturoj en la spektro de lumo montras inversajn temperaturojn!
Kontraŭa koloro: Koloro en kolor-paro kiu enhavas neniun komunan koloron kun la alia koloro en tiu paro. Kvanto da unu miksita en la alian de la paro grizigas la lastan, ŝanĝante la tonon. Fonto de termino Arkivo de Scienca Revuo – ero 371. Angle *complementary color*.
Rim. 1. Ekzemplo estas la paro ruĝa-verda/cejana. Verdo/cejano estas kreitaj de bluo kaj flavo. Ruĝo estas primara koloro. 2. Kontraŭaj koloroj intense kontrastas.
Kopalo: Rezino el arbo; uzita en lako, aparte la pli dura parte fosilia kopalo. Angle *copal*. **Rim**. Flaviĝas.
Kromata koloro: La koloroj de la spektro.
Kromata koloraro: Paletro de saturitaj koloroj; neniuj grizaj, nigraj aŭ blankaj farboj. Angle *chromatic palette*.
Kromata flavo, kromflavo: ☠Pigmento kun plumbo, do venena. Malheliĝema kun ne tre bona lumrezisto; anstataŭigita de kadmiflavo. Angle *chrome yellow*.
Kromverdo: Kromflavo + prusa bluo. Angle *chrome green*.
Kromata verdo, Pli hela kolornuanco ol kromverdo (PbCrOr pigmento + fercianida bluo): Brunswick green (el Duncan)
Lakbenzino:☠Derivita de petrolo, uzita kiel solvanto/solvilo. Termino el Angla-esperanta kemia vortaro de Duncan. Angle *mineral spirits, white spirit*.
Rim. Toksa, kaj la odora kaj la senodora versioj, kiel ankaŭ terebinto. Sugestita alternativa solvilo relative sendanĝera estas oleo de larĝfolia lavendo, Lavandula latifolia, angle *spike lavender oil*.
Lampnigro: Blunigra pigmento de karbono-nigro. Iam, lampnigro estis farita de fulgo de lampoj. **Rim.** 1. La blua

kvalito devas esti konsiderita dum preparo de miksaĵoj. 2. Sekiĝas malrapide. Angle *lampblack*.
Lejko: Klaso de pigmentoj kreitaj de tinkturoj traktitaj de metalaj saloj por doni econ de nesolvebleco. Multaj el tiu klaso ne estas lumrezistaj. Angle *lake*. **Rim**. La vorto venas de la vorto *lac*, do *lako*.
Lumrezista, lumimuna: Ebla daŭre teni saman nuancon de koloro sub seninterrompa lumo. Angle *lightfast, permanent*.
Malhelo^{mi}**:** 1. Malhela nuanco de koloro, miksita per aldono de nigro aŭ pli malhela kolornuanco. Angle *shade*.
Marsonigro^{mi}: Artefarita feroksida nigra pigmento opaka, senvenena kaj lumimuna. (PBk 11). Angle *Mars black*.
Mastikso, lentiska rezino: Rezino el la arbo lentisko; uzita en lako. Angle *Mastic (resin)*. **Rim**. Kiel ĉiuj naturaj rezinoj, mastikso flaviĝas.
Metilcelulozo: Ĝelo farita de celulozo kaj uzita por krei la plej molajn paŝtelojn. Angle *methylcellulose*.
Miksita koloro: Koloro kiu povas esti miksita de primaraj, bazaj koloroj, esceptante nigron. **Rim**. Efektive, miksaĵo povas sufiĉe alproksimiĝi al nigro por bone prezenti nigron.
Moligaĵo: Angle *plasticizer*. (laŭ Duncan)
Okro: Terpigmento kiu povas havi diversajn kolorojn, sed flavokro estas la kutima okro. Kiel la aliaj terpigmentoj, ofte la haveblaj versioj estas artefaritaj. Angle *ochre*.
Olepentrado: Tiu procedo de la pentrarto kiu uzas iun nature sekiĝeblan oleon kiel kaj la gluon kaj la vehiklon por pigmentoj. Angle *oil painting*.
Osta karbo: Densa, blu-nigra pigmento foje de ostoj, ofte artefarita. Angle *bone black, ivory black*. **Rim**. Ne enspiru la polvon.

Ovotemper(ad)o: Tiu procedo de la pentrarto kiu uzas emulsion de ovoflavo kutime, aŭ foje de la tuta ovo aŭ la ovoblankon miksitan kun akvo kiel la vehiklon por pigmentoj. Angle *egg tempera*. **Rim**. En PIV, la radiko *temper-* estas verbo.
Paliĝema, (fonto kun senkoloriĝo, paliĝo): Tendenca al kolorpaliĝo de pigmento kiam daŭre metita sub lumo; ne lumrezista. Angle *fugitive*.
Pasto: Dike aplikita farbo por doni teksturon. La vorto estas *impasto* en multaj lingvoj. **Rim**. Mi plivastigis la signifon.
Prusa bluo, pariza bluo, fercianida bluo: Intense malhela blua pigmento; la unua artefarita pigmento. Angle *prussian blue*.
Reologio: Scienco pri la fluo kaj ŝanĝado de formo de substancoj. Angle *rheology*.
Rutilo: La natura formo de titana dioksido. Angle *rutile*.
Sangado: 1. Tendenco en akvarelo en kiu la akvo moviĝas de malsekaj al sekaj partoj de akvarela paperfolio, puŝante pigmenton. La efektoj varias de strioj de farbo ĝis burĝonoj. Angle *bleed, blossom, bloom, backrun, backwash, runback* kaj pli. 2. En presado kaj glazurado, nedezirata ŝanĝiĝo de la koloro, ofte pro kontakto kun alkalo. Angle *bleed*. **Rim**. *mi* Mi aldonis tute novajn signifojn.
Sedimentiĝo: Fenomeno en akvarela pentrado, en kiu kelkaj grandaj pigmentoj tendencas deponiĝi en valetojn de paperfolio. → Flokiĝo. Ilustraĵo. Angle *granulation*. **Rim**. Tiu uzo de sedimentiĝo estas evidenta.
Sekundara koloro, duaranga koloro (alternative unuaranga *miksaĵo*): Koloro miksita de du primaraj koloroj; do kontraŭa koloro al la primara koloro ne en la

miksaĵo. Angle *secondary color*. **Rim**. Vikipedio ŝajnas kombini sekundarajn kaj terciarajn kolorojn, nomante sekundarajn kolorojn *unuarangaj miksaĵoj*. Laŭ tiu konvencio, terciaraj koloroj estu nomitaj *duarangaj miksaĵoj*. La miksaĵoj estu komprenitaj en kontrasto kun la bazaj, nemikseblaj koloroj.

Simpla kazeinfarbo: Kazeina gluvehiklo kaj pigmentoj kun neniu aldona oleo aŭ vakso, ankaŭ neniu aldona akrila vehiklo. Angle *true casein*.

Siena tero, seino: Unu el la terpigmentoj kaj unu el la plej fruaj uzitaj pigmentoj. Flavbruna kruda sieno kaj la ruĝbruna rostita sieno porĉiame tenas koloron. Nuntempe, artefaritaj versioj estas ofertitaj. Angle *sienna, raw sienna, burnt sienna*.

Sternita koloro, maldensa koloro[*mi*]: Koloro de pigmento kiam farbo estas sternita maldense aŭ miksita kun blanko. Angle *undertone*. **Rim**. Pigmento en farbo povas esti malsamaj koloroj kiam aplikita dense ol maldense.

Terciara koloro, triaranga koloro, alternative, duaranga *miksaĵo*: Koloro miksita de primara koloro kun sekundara koloro apuda en la koncerna kolorspaco, aŭ miksita de du sekundaraj koloroj. Vd. sekundara koloro.

Terpigmentoj: Mineraloj, precipe feroksidoj de argilo, uzitaj ekde prahistorio en farbo. Nuntempe, sintezitaj versioj de la terpigmentoj estas ofte uzitaj. Angle *earth pigments.*

Titana dioksido, titanblanko: Blanka, opaka pigmento kutime farita de rutilo. Angle *titanium dioxide, titanium white*. **Rim**. Povas havi kalkecan efikon en miksaĵoj, kiam multo estas uzita.

Tono: 1. Nuanco de koloro. 2. Perceptita relativa kvanto

da grizeco de koloro. Angle *tone, grayscale value, greyscale, shade*. **Rim**. 1. Mi elpensis difinon 2., specife por la desegna kaj pentra artoj. 2. Tono (2.) de koloro estas atingita per aldonoj de kaj blanko kaj nigro al koloro, malkiel helo (per aldono de blanko) kaj malhelo (per aldono de nigro); aŭ, alimaniere, per enmikso de kontraŭa koloro por grizigi la koloron. 3. Speciala kazo de tonoj estas la gamo de veraj grizoj. 4. Nigro kaj blanko estas la du ekstremoj de tuta gamo de tono.
Tragakanta gumo, tragakanto: Gumo ekstraktita el *Astragalus gummifer* kaj *A. tragacanthus*, i.a., kaj uzita kiel la gluo por paŝteloj, aparte molaj paŝteloj. Angle g*um tragacanth*. **Rim**. 1. La nomo estas derivita de la grekaj vortoj *tragos* kaj *akantha*. 2. Putras rapide.
Tuĉi: Mi uzas la vorton por signifi aldoni travideblajn tavolojn de kolorilo, per iu ajn peraĵo. Laŭ PIV: Kolorigi surpaperan desegnon, etendante maldensan akvan farbon k iom post iom intensigante la tonon per plurfoja frotado de la peniko sur la jam sekiĝintaj farbotavoloj. Angle *glaze*. (Mi havas dubojn pri tiu uzo, ĉar ne temas pri ĉina inko.)
Ultramaro: 1. Natura blua pigmento el lazurito aŭ pli malmultekosta artefarita pigmento. 2. Intense blua koloro. **Sin**. *Lazura bluo*. Angle *ultramarine*. **Rim**. La koloro estas pli intensa ol ĉielbluo.
Umbro: Terpigmento kiu aspektas en kruda formo kiel okro sed pli malhela. Rostita umbro estas malhela bruno. Angle *umber*.
Vehiklo: La tuto de la flua parto de farbo. En simpla kazeina farbo, la tuto de la fluaĵo estas, verdire, gluo. Tamen, eblas trempi la penikon en akvon dum pentrado; tiaokaze, akvo servas kiel dumpentra vehiklo. Ankaŭ, eblas aldoni oleon aŭ akrilan vehiklon al la simpla

kazeina gluo. Angle *vehicle*. **Rim**. Mia uzo de la termino; plivasta senco.
Volatila organika kombinaĵo: Organika kombinaĵo kiu vaporiĝas je ordinara temperaturo de ĉambro. Fonto. Angle *volatile organic compounds.* **Rim**. Kelkaj, kiel tiuj en lakbenzino, estas toksaj al homoj kiuj dum longa tempo restas en sama medio kun ili.
Zinka oksido, zinkoblanko: Blanka pigmento; la plej travidebla de la oftaj uzitaj blankaj pigmentoj. Permesas subtilajn helojn kun travidebleco. Rigida. Angle *zinc white.* **Rim**. Pro troa rigideco, ĉi tiu pigmento ne estu uzita kiel la sola pigmento en farbotavolo sur streĉita kanvaso.

Jen, kelkaj interesaj terminoj el Granda Vortaro Ĉina-esperanta, ofte pri ĉina inko, por doni (al mi) ideon:

> 文房四宝 la kvar trezoroj de la kabineto de klerulo aŭ pentristo (t.e. skribpeniko aŭ tuĉpeniko, tuĉbastoneto, tuĉfrota ŝtonplato kaj papero)

Mia rimarko: La tradicia inko estas solida, el fulgo kaj gluo, formita en bastoneton. Por krei fluantan inkon, la artisto aŭ klerulo frotas tiun tuĉbastoneton sur la ŝtonplaton kune kun akvo.

> 【白描】[báimiáo] konturdesegnado per peniko sen kolora tuĉado

> 【花卉】[huāhuì] pentraĵo de floroj en la tradicia ĉina stilo

> 【花鸟】[huāniǎo] pentraĵo de floroj kaj birdoj

(en la tradicia ĉina stilo): 花鸟画 flor-kaj-birda pentraĵo

【仕女】[shìnǚ] (美女画) tradicia ĉina pentraĵo prezentanta belulinojn

【水墨画】[shuǐmòhuà] tuĉdesegno; tuĉpentraĵo: 中国水墨画 ĉinstila tuĉdesegno [tuĉpentraĵo]
【皴法】[cūnfǎ] vejnomontra metodo (la farado de penikostrekoj, kiuj donas vejnojn al pentritaj rokoj, montoj, arboj ktp en ĉinstila pejzaĝa pentraĵo)

【工笔】[gōngbǐ] tradicia ĉina realisma pentrado karakterizita per delikata tuĉado kaj atento al detaloj; pentrado per delikataj tuĉoj ◇ 工笔画 ĉina pentraĵo karakterizita per delikata tuĉado; delikat-tuĉa [delikatlinia] pentraĵo

【翎毛】[língmáo] speco de klasikaj ĉinaj pentraĵoj prezentantaj birdojn kaj animalojn

【泼墨】[pōmò] inkŝpruco (tekniko de ĉina inkpentrarto): 泼墨山水 inkŝpruce pentrita pejzaĝo

【漆画】[qīhuà] lakita pentraĵo; lakpentraĵo